

Deklaro de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj (CoNGO) okaze de la 75-a Jubileo de Unuiĝintaj Nacioj

RESUMO

La Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj (CoNGO) estas sendependa, internacia asocio kiu faciligas la partoprenon de NROj (neregistaraj organizoj) kun Unuiĝintaj Nacioj. Ekde la jaro 1948, CoNGO engaĝiĝas kun UN per pli ol tridek Substancaj Komitatoj de NROj. CoNGO aprobas la celojn kaj valorojn enkadrigitajn en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj argumentas por multflankismo por solvi politikajn, naturmediajn, sanecajn kaj aliajn defiojn. Ni rekonfirmas la centran rolon de Unuiĝintaj Nacioj en pli paca kaj pli justa mondo, kie ĉiuj homoj havu aliron al edukado, sano, juraj rimedoj, demokratia partopreno kaj ekonomia antaŭeniro. Okaze de la 75-a Jubileo de Unuiĝintaj Nacioj, CoNGO salutas la atingojn de Unuiĝintaj Nacioj en daŭrigo de paco kaj sekureco, apogo de homaj rajtoj, kaj antaŭenigo de daŭripova evoluigo.

Agendo 2030 estas kadro por elimini malriĉon, redukti malegalecon, kaj protekti la planedon. Sed la progreso ne ĝisatingis la bezonon. Atingi la Mondon de ni Deziratan kaj la Mondon de ni Bezonatan postulas aktivajn partnerecojn inter internaciaj unuoj, registaroj, lokaj instancoj, entreprenoj kaj la civila socio. Okaze de la 75-a Jubileo, ni devas transiri el klimato de naciismo, konflikto kaj maljusto al kulturo de multflankismo, paco kaj sekureco, por la bono de la tuta homaro.

CoNGO alvokas, ke la 75-a Jubileo estu okazo por plifortigi Unuiĝintajn Naciojn kaj plivastigi ĝian rolon en pli efika engaĝiĝo de la civila socio ĉiuloke. Temas pri okazo ekdialogi por atingi strukturojn de interrilatoj kiu respondas al la defioj de ŝanĝiganta mondo. Okaze de tiu ĉi 75-a Jubileo, ni instigas ĉiujn registarojn, ke ili plifortigu sian sindevigon al Unuiĝintaj Nacioj ne nur morale sed ankaŭ finance kaj materie.

Unuiĝintaj Nacioj devas adapti sin al ŝanĝigantaj bezonoj kaj realoj, por plialtigi siajn kredeblon kaj efikecon, kaj garantii inkluzivan decidadon je ĉiuj niveloj. Fortigi Unuiĝintajn Naciojn necesigos larĝan subtenon kaj engaĝiĝon de la civila socio kaj de civitanoj ĉie, kaj flekseblon en dialogado kun ili kaj en aŭskultado de iliaj zorgoj.

Dum Unuiĝintaj Nacioj festas siajn unuajn 75 jarojn, ni havas bonan okazon por reviziti la pasintecon, difini la nuntempon kaj muldi novan estontecon. La homaro ne povas atendi. Paco, justeco kaj evoluigo dependas de home fokusitaj aliroj por transformi niajn ekonomion, socion kaj ĉirkaŭaĵon. Ni devas intensigi niajn fortojn por certigi, ke neniu homo postlasiĝas.

12 oktobro 2019
Novjorko | Genevo | Vieno

For more information:
Liberato C. Bautista, CoNGO President (president@ngocongo.org)

CoNGO INTERNATIONAL SECRETARIAT

CoNGO New York | Office of the President, 777 UN Plaza, Suite 7C, New York, New York 10017 | T: +1 212 973 1701 | E: president@ngocongo.org
CoNGO Geneva | PostBox 50, 1211 Geneva 20, Switzerland | T: +41 22 301 1000 | F: +41 22 301 2000 | E: firstvp@ngocongo.org
CoNGO Vienna | Box 500 VIC, A 1400 Vienna, Austria | T: +43 1 260 60 4422 | E: secondvp@ngocongo.org

Declaration of the Conference of Non-governmental Organizations in Consultative Relationship with the United Nations (CoNGO) on the Occasion of the 75th Anniversary of the United Nations

La Unuaj 75 Jaroj de Unuiĝintaj Nacioj

1. Okaze de la 75-a Jubileo de Unuiĝintaj Nacioj, la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj (CoNGO) salutas la atingojn de Unuiĝintaj Nacioj en konservado de paco kaj sekureco, plifortigo de homaj rajtoj, kaj antaŭenigo de daŭripova evoluigo. La simpla ekzisto de Unuiĝintaj Nacioj atestas la notindan progreson kiun faris la homaro. Unuiĝintaj Nacioj helpis evoluigi regulare bazitan internacian ordon per Konvencioj kaj Paktoj kiuj starigas normojn de bona regado, jura reguligo kaj protektado de homaj rajtoj por ĉiuj homoj. Ĝi tenis superrigardon pri la defia procedo de malkoloniigo kaj reduktis malkonsentojn inter siaj Membraj Ŝtatoj. Ĝi helpis alkonduki racion kaj justecon kie antaŭe regis kaoso kaj sangoperdo.
2. Inter la juraj instrumentoj kiujn evoluigis Unuiĝintaj Nacioj estas internaciaj interkonsentoj pri protektado de vundeblaj kaj malavantaĝaj personoj, la batalo kontraŭ rasismo, la konservado de vivtena planedo, sekureco sur la maroj kaj en la aero, universala edukado, konservado de la homaj heredaĵoj kaj kulturoj, ekonomia bonfarto, genra egaleco, deca laboro kaj reduktado de la riskoj de katastrofoj. Unuiĝintaj Nacioj apogis la pacan solvodon de internaciaj disputoj, helpis preventi konfliktojn en malpacaj regionoj, kaj alportis asiston al multnombraj viktimoj de militoj. En la 1990aj jaroj, mondaj kongresoj kaj pintkonferencoj engaĝis la tutmondan civilan socion en akceptado de deklaroj kaj programoj postulantaj plenan kaj efikan plenumadon. La Celoj por Daŭripova Evoluigo de Agendo 2030 liveras itineron por pozitiva agado de registaroj, civilsociaj organizoj, lokaj instancoj, industrioj, lernejoj kaj universitatoj, kaj individuaj civitanoj tra la tuta mondo, por kune labori cele al la Mondo de ni Dezirata kaj la Mondo de ni Bezonata.
3. Sed la laboro de Unuiĝintaj Nacioj estas nekompleta. La atingadon de internacia ordo, paco kaj homaj rajtoj ankoraŭ tro ofte subfosas trudado de mallarĝaj naciaj interesoj, strebado al ekonomia avantaĝo, militado, kaj subpremado de la homaj rajtoj de individuoj kaj grupoj. La mondo alfrontas senprecedencajn defiojn kiuj estas, en iuj okazoj, ekzistodifinaj: klimatsanĝiĝon, disrompajn teknologiojn, pli mortigajn armilojn de amasdetruo, la ekstreman polusiĝon de riĉeco kaj rilataj malegalecoj. Efektive, la fondojaroj de Unuiĝintaj Nacioj koincidis kun la enkonduko de la teruroj de nuklea milito. La nuna ritmo de konfrontado de tutmondaj problemoj neadekvatas; necesas pli granda urĝo kaj pli forta sindediĉo por forpuŝi la potenciale katastrofajn batojn de tiuj novaj evoluoj.

CoNGO INTERNATIONAL SECRETARIAT

CoNGO New York | Office of the President, 777 UN Plaza, Suite 7C, New York, New York 10017 | T: +1 212 973 1701 | E: president@ngocongo.org
CoNGO Geneva | PostBox 50, 1211 Geneva 20, Switzerland | T: +41 22 301 1000 | F: +41 22 301 2000 | E: firstvp@ngocongo.org
CoNGO Vienna | Box 500 VIC, A 1400 Vienna, Austria | T: +43 1 260 60 4422 | E: secondvp@ngocongo.org

4. Hodiaŭ, la Celoj por Daŭripova Evoluigo fortigis nian konscion, ke la povo de Unuiĝintaj Nacioj ne sufiĉas: la plenumo de Agendo 2030 postulas aktivan engaĝiĝon de amaso de partnerecoj inter internaciaj unuoj, registaroj, lokaj instancoj, la privata sektoro, kaj la civila socio en ĉiuj ĝiaj manifestiĝoj. Tiaj partnerecoj sekvu administrajn principojn kiel ekzemple travideblon kaj respondecon en antaŭenigo kaj protektado de la homaj rajtoj de civitanoj kaj de popoloj kiel rajtoposedantoj.

Alfronti Persistajn kaj Nove Aperantajn Tutmondajn Defiojn

5. Antaŭ dudek jaroj, la Deklaro de la Jarmila Forumo, ellaborita de 1350 reprezentantoj de pli ol mil neregistaraj organizoj el la tuta mondo, atentigis pri la kreskado de rasismo, faŝismo, ksenofobio, homofobio, krimoj de malamo, kaj etnocido. Ĝi notis rekreskon de patriarkio, kiu minacas subfosi la atingojn en la kampo de genra egaleco. Ĝi atentigis pri la persisto de infanlaborigo kaj la senpuneco ĝuata de tiuj, kiuj malobservas homajn rajtojn. Ĝi altiris atenton al eksplodo de perforto, militismo kaj armitaj konfliktoj, kaj al kreskado de aŭtoritismaj reĝimoj.
6. En la jaro 2020, tiuj minacoj persistas, plifortigate de la disvastiĝo de populismaj dogmoj, retiriĝo for de internaciaj normoj, traktatoj kaj interkonsentoj, kaj forĵeto de multflankismo favore al tagordoj ekskludismaj kaj ksenofobiaj. Ĉirkaŭ la mondo, homoj suferas pro malegalecoj, rajtoperdoj kaj genra maljusto, kaj alfrontas konfliktojn, militizadon, terorismon kaj difektiĝon de la naturmedio. Pli ol 70 milionoj da homoj estas relokigitaj pro senbride perforta konflikto, persekutado, malstabilo, klimatsanĝiĝo kaj naturaj katastrofoj. Multe tro ofte, ekonomiaj, financaj kaj politikaj sistemoj koncentras potencon kaj riĉecon en la manojn de kelko. La belo kaj diverso de la popoloj de la mondo, precipe indiĝenaj popoloj, inkluzive de iliaj kulturoj kaj lingvoj, estas ĉiam pli endanĝerigitaj, kaj la biodiverson de la flaŭro kaj faŭno de la mondo minacas klimatsanĝiĝo kaj nedaŭrigeblaj industriaj procedoj.
7. La defioj, kiujn frontas la homaro kaj la planedo, postulas urĝan atenton. La efikoj de klimatsanĝiĝo minacas la sekurecon de nutraĵoj kaj akvo kaj la diversecon de specioj, kaj kontribuas al migrado. Genra egaleco estas nenie en la mondo plene atingita; seksismo kaj seksisma konduto restas enradikiĝintaj kaj plifortigas genrajn stereotipojn. Genre bazita perforto, seksa komercado, infana edzinigo kaj generila mutilado de knabinoj daŭras. Multaj infanoj, precipe knabinoj, ne frekventas lernejojn; la efikoj de konfliktoj kaj devigata relokigo estas aparte akutaj en la unuaj jaroj de la infana vivo, kaj havas negativajn konsekvencojn por tutaj socioj. Sanservoj ne estas universale haveblaj. Manko de aliro al socia protekto produktas severajn konsekvencojn ĉe la plej marĝenaj kaj laborantaj malriĉuloj, precipe virinoj en la neformala sektoro. Korupto, kontraŭleĝaj financaj fluoj kaj impostevito subfosadas la kapablon de registaroj mobilizi rimedojn. Jardekon post la tutmonda financa krizo, la tutmonda ŝuldado atingis rekorde altajn nivelojn. Tra la tuta mondo, oni ofte malgravigas aŭ renversas homajn rajtojn. Gazetara libereco estas vaste malatentata, kaj oni enkarcerigas aŭ murdas ĵurnalistojn. Eĉ tiuj, kiuj laboras por la paco, kiel ekzemple interpretistoj kaj sanservaj laborantoj, estas atakataj kaj mortigataj. La kiberspaco kreis novan rendezuon por krima agado je giganta skalo.

CoNGO INTERNATIONAL SECRETARIAT

CoNGO New York | Office of the President, 777 UN Plaza, Suite 7C, New York, New York 10017 | T: +1 212 973 1701 | E: president@ngocongo.org
CoNGO Geneva | PostBox 50, 1211 Geneva 20, Switzerland | T: +41 22 301 1000 | F: +41 22 301 2000 | E: firstvp@ngocongo.org
CoNGO Vienna | Box 500 VIC, A 1400 Vienna, Austria | T: +43 1 260 60 4422 | E: secondvp@ngocongo.org

www.ngocongo.org

8. La promeso deklarita en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, ke finiĝu la skurĝo de milito, restas plejparte nerealigita de ĝiaj membraj registaroj; multe pli da mono estas elspezata por militpreteco ol por daŭrigebla evoluigo. Militizado kaj la forlasado de limigoj pri armiloj fortigas la bezonon de malarmado, precipe nuklea malarmado. Dum memoroj pri monda milito velkas kaj tiuj pri koloniaj konfliktoj perdas sian forton, Unuiĝintaj Nacioj, la civila socio kaj registaroj devas pli forte labori, kaj labori kune, por proskribi armitan konflikton porĉiame, por ke estontaj generacioj ne ripetu la nenuligeblajn erarojn de siaj antaŭuloj.
9. **Okaze de la 75-a Jubileo, ni devas movi nin for de plivastigado de militoj kaj klimato de konfliktoj kaj maljusto, al kulturo de paco kaj sekureco, por la bono de la tuta homaro. Jam venis la momento kiam humanaj, evoluigaj kaj pacaj agantoj kunlaboru kohere por meti finon al tutmonda perforto kaj por atingi la ambiciajn celojn de Agendo 2030 – nome pacon kaj prosperon por la homoj kaj la planedo.**

Renovigi la Promeson de Unuiĝintaj Nacioj

10. Unuiĝintaj Nacioj devas engaĝi la Membrajn Ŝtatojn en agado kiu superas nuran akcepton kaj plifortigas ilian respondecon antaŭ la homoj kiujn ili servas. Ni bezonas nove vigligitan multflankismon por plipotenci la agadon por alfronti tutmondajn problemojn kiel ekzemple klimatsanĝiĝon kaj devigatan migradon, por rapidigi progreson pri daŭrigebla evoluigo, kaj por sekurigi sanajn, pacajn kaj prosperajn vivojn por ĉiuj homoj ĉiuloke.
11. Necesas fortigi kaj igi pli egaleca la Sistemon de Unuiĝintaj Nacioj, cele al adaptiĝo al ŝanĝiĝantaj bezonoj kaj realoj. La komunika revolucio havas potencialon por demokratiigi engaĝon je ĉiuj niveloj. Unuiĝintaj Nacioj reekzameni sian komunikadon kun siaj diversaj publikoj, parolante al ili, kaj ankaŭ aŭskultante ilin, en lingvoj kiujn tiuj publikoj komprenas. Per tio, ĝi fariĝos pli kredebla kaj efika, garantianta respondeman, inkluzivan, partoprenan decidadon ĉiunivele.
12. Inter la fundamentaj postuloj pri renovigita organizo de Unuiĝintaj Nacioj estas sekura financa bazo por ĝia laboro. La buĝeto de Unuiĝintaj Nacioj estas malpli granda ol tiu de pluraj municipoj, lokaj instancoj kaj multnaciaj entreprenoj. Membraj ŝtatoj devas liveri sufiĉajn rimedojn por tiuj programoj kaj agadoj kiujn ili mem postulis; ili devas pagi siajn financajn kontribuojn ĝustatempe, plene, kaj sen kondiĉoj. Multaj financaj rimedoj liveritaj de registaroj estas limigitaj per specifaj destinadoj, ekskludoj aŭ rifuzo financi difinitajn agadojn. Iuj registaroj malobservas siajn traktatajn devojn per prokrastado de jaraj pagoj. Dum ni fidus al Unuiĝintaj Nacioj, ke ĝi solvu mondajn problemojn, registaroj ŝanĝas siajn prioritatojn de unu jaro al alia kaj malhelpas la kapablon de la organizo plani por la estonteco. Financaj baroj estas plue komplikitaj de limigoj al flekseblo kaj rifuzo devontigi sin al longperspektivaj solvoj.
13. While sufficient funding is an essential component of a strengthened and revitalized United Nations, effective and transparent management practices are equally important. Secretariat and Agency heads must be given adequate authority and clear guidelines to address emerging crises, whether political, humanitarian, economic, environmental, military or judicial. Well-managed and well-funded Peacekeeping and Peacebuilding operations are particularly important. In this connection, the policies and decisions of

CoNGO INTERNATIONAL SECRETARIAT

CoNGO New York | Office of the President, 777 UN Plaza, Suite 7C, New York, New York 10017 | T: +1 212 973 1701 | E: president@ngocongo.org
CoNGO Geneva | PostBox 50, 1211 Geneva 20, Switzerland | T: +41 22 301 1000 | F: +41 22 301 2000 | E: firstvp@ngocongo.org
CoNGO Vienna | Box 500 VIC, A 1400 Vienna, Austria | T: +43 1 260 60 4422 | E: secondvp@ngocongo.org

www.ngocongo.org

the World Bank and the International Monetary Fund are often at odds with one another and with others within the United Nations system. Accordingly, a review of the international financial architecture is needed, aimed at advancing the efforts of developing countries to meet their fiscal, monetary, trade and development needs while maintaining democratic control of their economies.

- 14. Okaze de la 75-a Jubileo, ni instigas ĉiujn registarojn plifortigi sian subtenon al Unuiĝintaj Nacioj, morale, finance, materie. Ni alvokas al ĉiuj Membraj Ŝtatoj, ke ili rekonu la neceson de multflankaj aliroj por alfronti tutmondajn problemojn; ili sentu sin respondecaj por transformi retorikon en agadon; ili plenumu siajn financajn sindevigojn, kaj ili liveru adekvatajn rimedojn por kontentigi esencajn longperspektivajn bezonojn.**

CoNGO kaj Unuiĝintaj Nacioj

15. CoNGO estas sendependa, internacia membrara asocio fondita en la jaro 1948, la jaro de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Kiel neregistara organizo (NRO) en ĝenerala konsulta statuso kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN, nia laboro rilatas al la tuta Sistemo de Unuiĝintaj Nacioj: la Sekretariato, Agentejoj, Traktataj Unuoj, Regionaj Komisionoj, Institutoj, Pintkonferencoj kaj Mondaj Konferencoj. CoNGO plenkore konfirmas la celojn kaj valorojn entenatajn en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, kaj estas forta pledanto por multflankismo por solvi tutmondajn politikajn, naturmediajn, sanajn kaj aliajn minacojn. Ni instigas neregistarajn organizojn tra la mondo kunlabori kun Unuiĝintaj Nacioj por antaŭenigi kaj subteni ĝian laboron kaj altiri la civilan socion en daŭran partnerecon kun la monda organizo. Pli ol 30 Substancaj Komitatoj de NROj, ligitaj al CoNGO en Novjorko, Ĝenevo, Vieno kaj tutmonde montras nian sindevigon al subtenado de la celaro de Unuiĝintaj Nacioj.
16. La membraro de CoNGO konsistas el diversaj NROj kiuj laboras en konsulto kun Unuiĝintaj Nacioj, en kunlaboro inter si, kaj en kunagado kun aliaj samideaj kunlaborantoj. CoNGO rekonas sian rolon en plivalorigo de la klopodoj de niaj membroj por efike kontribui al la atingado de celoj interkonsentitaj de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝiaj Membraj Ŝtatoj. Ni aparte subtenas gejunulojn kaj junularajn organizojn kiel aktivajn partoprenantojn kaj partnerojn en ĉiuj agadoj de Unuiĝintaj Nacioj.
17. CoNGO ne evitis pozitive kritiki la interregistaran mekanismon kiam tiu mekanismo ŝajnis neadekvata al la idealoj de la Ĉarto. Ni identigis obstaklojn kaj manierojn ilin superi, kaj ni kuraĝigis la unuojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj Membraj Ŝtatoj labori pli produktive kun NROj. Ni instigis ĉiujn civilsociajn organizojn kunlabori kun registaroj en interregistaraj decidaj procedoj sub aŭspicio de Unuiĝintaj Nacioj.
18. CoNGO konscias pri la mankoj en la Sistemo de Unuiĝintaj Nacioj kiuj subfosas ĝian efikecon, ĝian regeblon kaj ĝian kredindecon. La formale interkonsentitaj interregistaraj decidoj kaj instrumentoj estas fortaj deklaroj de principo kaj intenco, sed registaroj ofte neglektas realigi la interkonsentojn kiujn ili aprobis multflankisme. Tiuj interregistare subskribitaj tekstoj konsistigas promesojn, kiujn registaroj faras al siaj popoloj: evidente registaro havas devon plenumi siajn promesojn. Simpla akcepto ne sufiĉas: ĝin akompanu

CoNGO INTERNATIONAL SECRETARIAT

CoNGO New York | Office of the President, 777 UN Plaza, Suite 7C, New York, New York 10017 | T: +1 212 973 1701 | E: president@ngocongo.org
CoNGO Geneva | PostBox 50, 1211 Geneva 20, Switzerland | T: +41 22 301 1000 | F: +41 22 301 2000 | E: firstvp@ngocongo.org
CoNGO Vienna | Box 500 VIC, A 1400 Vienna, Austria | T: +43 1 260 60 4422 | E: secondvp@ngocongo.org

www.ngocongo.org

sindevigo kaj agado.

- 19. Okaze de la 75-a Jubileo. CoNGO reagnoskas la centran rolon de Unuiĝintaj Nacioj por atingi pli pacan kaj pli justan mondon, kie ĉiuj homoj havas aliron al edukado, sano, jura helpo, demokratia partopreno, kaj ekonomia kaj socia antaŭeniĝo. Ni ree emfazas nia sindediĉon al la celoj, etiko kaj vizio kiujn ni dividas kun Unuiĝintaj Nacioj. CoNGO alvokas, ke tiu ĉi jubileo estu okazo por plifortigi Unuiĝintajn Naciojn, per ekspansio de ĝia rolo por pli efike engaĝi la civilan socion kaj bonvolemajn homojn ĉie.**

La Rolo de la Civila Socio

20. La rolo de NROj estas priskribita en Artikolo 71 de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, kaj la starigo de formala konsulta statuso por NROj kun EKOSOK estis fundamenta por la sistemo de internaciaj rilatoj. Rezolucio 1996/31 de EKOSOK preskribas la starigon de konsultaj rilatoj kaj ankaŭ de akreditado de pli vasta civilsocia grupo al konferencoj de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi enhavas principojn kaj aranĝojn por regula partoprenado de NROj en specifaj unuoj de Unuiĝintaj Nacioj; tiuj aranĝoj montriĝis daŭre efikaj kaj ĝuas larĝan subtenon de NROj. CoNGO maltrankvilas pri la ŝrumpanta spaco por la civila socio. Libereco de kunvenado, opinio kaj esprimo estas esencaj rajtoj de ĉiu homa estaĵo, sed kreskanta nombro de landoj limigas tiujn rajtojn, traktante la civilan socion kvazaŭ minacon, anstataŭ kiel partneron laborantan por atingi komunajn celojn. Iuj registaroj enkarcerigas civilsociajn aktivulojn aŭ utiligas perforton por subpremi pacajn kunvenojn kaj demonstraciojn. Ili formale akceptas la rekomendojn de Unuiĝintaj Nacioj dum ili ignoras ilin en la praktiko. La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj rilataj internaciaj konvencioj kaj paktoj devas esti universale aplikataj. Unuiĝintaj Nacioj devas certigi, ke NROj havu maksimuman aliron al la unuoj de Unuiĝintaj Nacioj, por ebligi iliajn plenajn kontribuojn de kompetentoj, fakaj scioj, energio kaj sperto.
21. La civila socio mem ŝanĝiĝas. La preskaŭ tuja mobilizado de sociaj movadoj ebligata de sociaj mediatroj renversas tradiciajn formojn de socia agado. La novaj strukturoj de la civila socio ofte ne kongruas kun la hierarkiaj strukturoj de regado ene de Unuiĝintaj Nacioj kaj en Membraj Ŝtatoj. CoNGO sin devigas plibonigi retumadon, integri la perspektivojn de diversaj partneroj, kaj krei skalefikojn por havi pli grandan influon al mondaj problemoj. CoNGO sin devontigas labori kun Unuiĝintaj Nacioj por eltrovi kiel starigi pli bonan komunikadon kun ties partneroj, por ke la voĉoj de "Ni la popoloj" estu aŭdataj kaj pritraktataj. La rekonstruo de la komponantoj de Unuiĝintaj Nacioj pri informado kaj diskonsultado ludas centran rolon tiurilate.
22. La Altnivelaj Politikaj Forumoj, la Junulara Forumo de EKOSOK kaj aliaj novaj mekanismoj jam spilas la energion generatan de civilsociaj movadoj. Samtempe tamen, la proceduro por rekono de NROj fare de la Ekonomia kaj Socia Konsilio apenaŭ ŝanĝiĝis ekde siaj fruaj jaroj, kaj estas daŭre forte politikigita. Tiuj streĉitecoj negative influas la sistemon de Unuiĝintaj Nacioj por rilatoj kun NROj, inkluzive de tiuj ligitaj al CoNGO. Parto de la misio de CoNGO estas certigi, ke la civila socio havu aliron al Unuiĝintaj Nacioj, plibonigi kunlaboron, labori por ŝanĝoj kaj faciligi atingon de la celoj interkonsentitaj de Unuiĝintaj Nacioj kaj Membraj Ŝtatoj.

CoNGO INTERNATIONAL SECRETARIAT

CoNGO New York | Office of the President, 777 UN Plaza, Suite 7C, New York, New York 10017 | T: +1 212 973 1701 | E: president@ngocongo.org
CoNGO Geneva | PostBox 50, 1211 Geneva 20, Switzerland | T: +41 22 301 1000 | F: +41 22 301 2000 | E: firstvp@ngocongo.org
CoNGO Vienna | Box 500 VIC, A 1400 Vienna, Austria | T: +43 1 260 60 4422 | E: secondvp@ngocongo.org

www.ngocongo.org

23. Okaze de la 75-a Jubileo, ni alvokas al Unuiĝintaj Nacioj, ke ĝi komencu dialogon kun la civila socio cele al kreo de novecaj partnerecoj kiuj respondas al la defioj de ŝanĝiganta mondo. La spirito de Agendo 2030 postulas vigan partoprenon de la popoloj de la mondo, por ke la avantaĝoj de multflankismo estu sentataj en iliaj ĉiutagaj vivoj. Ĉiu homo devas kune labori por ke tiu organizo de Unuiĝintaj Nacioj, kiun ni bezonas por la mondo kiun ni deziras, prosperu en regulare bazita internacia ordo. Ni alvokas al Membraj Ŝtatoj, ke ili rekonu la vastan potencialon de la civila socio kiel esenca elemento en la internacia sistemo, kaj kiel difinilo de la nuntempo kaj muldilo de la estonteco. Ni devas malmunti la obstaklojn al fizika kaj politika aliro al la procedoj de Unuiĝintaj Nacioj, por tiel atingi internacie interkonsentitajn evoluigajn celojn kaj realigi programojn de socia justeco.

Neniu Homo Postrestu

24. Dum Uniĝintaj Nacioj kaj ties Membraj ŝtatoj festas la unuajn 75 jarojn, venis tempo por reviziti la pasintecon, difini la nuntempon kaj muldi novan estontecon. La homaro ne povas atendi. La "Popoloj" kiuj donis voĉon al la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj kiuj rigardas la Membrajn Ŝtatojn kiel siajn reprezentantojn, postulas, ke la monda unuo leviĝu al siaj promesoj kaj enkonduku transforman ŝanĝiĝon. Paco, justeco kaj evoluigo dependas de plenaj, homrajte bazitaj, home centritaj, kaj genrosentemaj aliroj al la sistemoj kiuj fundamentas nian ekonomion, nian socion kaj nian ĉirkaŭaĵon. Ni devas fortigi la impulson por transformi la mondon kaj certigi, ke neniu homo postrestas.

12 October 2019
New York | Geneva | Vienna

For more information:
Liberato C. Bautista, CoNGO President (president@ngocongo.org)

CoNGO INTERNATIONAL SECRETARIAT

CoNGO New York | Office of the President, 777 UN Plaza, Suite 7C, New York, New York 10017 | T: +1 212 973 1701 | E: president@ngocongo.org
CoNGO Geneva | PostBox 50, 1211 Geneva 20, Switzerland | T: +41 22 301 1000 | F: +41 22 301 2000 | E: firstvp@ngocongo.org
CoNGO Vienna | Box 500 VIC, A 1400 Vienna, Austria | T: +43 1 260 60 4422 | E: secondvp@ngocongo.org

www.ngocongo.org